

Heinrich Heine,  
Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, III  
*tradukita de Manfred Retzlaff*

Solece tra tiu arbaro  
Ĉagrene promenas mi;  
Jen venas malnova revaro,  
La koron eniĝis ĝi.

Ho, kiu vin instruigas,  
Aera birdaro vi!  
Se mia kor' vin aŭdintas,  
Denove doloras ĝi.

Ja aŭdis mi fraŭlineton,  
Ĝin ĉiam kantis ŝi,  
Kaj tiam la vorteton  
Ekkaptis birdoj ni.

Neniam rakontu vi tiun  
Vorteton plu al mi!  
Mi fidas ja nenium,  
Vi birdoj, plenegaj de sci'.

Ho, lasu al mi la ĉagrenon,  
Ne ŝtelu ĝin for de mi.  
Atendas mi ŝian revenon,  
Por ĉiam sopiras al ŝi.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, III" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR-134 / Arg-701-1412 (2012-12-06 11:36:03)*